



Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73 Caixa Postal 07 - 1182

Telefone 4-8033

11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090

70.000 - Brasília (DF)

CGC Nº

00406 504/1000-06

ANO IV

NOVEMBRO DE 1978

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

Nº 40

Redação: MARIA ALMADA

LA UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ ESTAS 30-JARA

Dum la 63-a Universala Kongreso de Esperanto, en Varno, Bulgario, la Komitato de UEA akceptis laborplanon pri la trideka datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Unu el la celoj de la Unuiĝintaj Nacioj, laŭ artikolo 1 de ĝia Ĉarto estas atingi internacian kunlaboradon por antaŭenigi kaj stimuli respekton al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj de ĉiu personoj sen konsidero pri raso, sekso, lingvo aŭ religio.

La 10-an de decembro 1948, la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj akceptis la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, tiel agnoskante sian devon ŝirmi kaj celi la homajn rajtojn de la civitanoj de ĉiuj nacioj.

La Universala Deklaracio konsistas el 30 artikoloj. Tiuj artikoloj rilatas parte al civilaj kaj politikaj rajtoj: jura egaleco, libereco de opinioj kaj esprimiĝo, partopreno en publikaj aferoj kaj elektoj, religia libereco, ktp.

Aliaj artikoloj, kiuj pritraktas ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn: rajton labori, rajton eduki kaj partopreni la kulturan vivon.

La Asembleo proklamis la Universalan Deklaracion "komuna celo de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj". Pere de la rezolucio de 1950 ĝi nomis la 10-an de decembro de ĉiu jaro "Tago de la Homaj

Rajtoj".

En Varno UEA rekonis la periodon de la 10-a ĝis la 15-a de decembro kiel "Semajnon de la Homaj Rajtoj kaj Esperanto".

La prezidanto de UEA, D-ro Humphrey Tonkin diris: "Ĉijare viaj Zamenhof-festoj havu sian apartan karakteron: ili memorigu ne nur la aŭtoron de la Internacia Lingvo sed ankaŭ la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj".

Por propagandi pri Esperanto kiel internacia komunikilo, UEA sugestas, ke ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj aktive partoprenu la Semajnon de Homaj Rajtoj kaj Esperanto.

Estas grave, ke ĉiuj organizu kunsidojn nacilingvajn dum la Semajno, pretigu taŭgajn artikolojn por la lokaj gazetoj, elektu kapablan preleganton kaj invitu aŭtoritatulojn partopreni ĝin. Faru programojn en la lernejoj kunvokante la instruistojn. Ĉiuj parolu pri la Homaj Rajtoj, ligante ĝin al la vivo de Zamenhof, ĉar lia vivo respegulas la bazajn idealojn de la Homaj Rajtoj.

Kunlabore kun tiu temo ni kunvokas niajn estimatajn vicprezidantojn kaj gesamideanojn, kiuj neniam mankas en ĉiaspecaj sencoj, kiam ilin la movado bezonas, ke laŭ sia ebleco, agadu dum tiu grava Semajno, la plej aktive. Jam multaj el ni laboras sur la propaganda kampo kaj la aliaj, kiuj povas fari la samon, volu ekagi. Estas ne nur nepre cecese, sed temas pri nia devo eluzi la okazon por

diskonigi pere de radiostacioj, gazetoj, kluboj, la Zamenhofan idealon kaj la homajn rajtojn. Neniam estis tiel grava kiel nun frata kaj amika kunlaborado en nia lando.

Ni ne forgesu, ke ni preparas la tere-non por la Universala Kongreso en Brazilo por la jaro 1981-a. D-ro Tonkin personi raportos pri la rezultato al UNESKO.

Ni kredas kaj fidas je nia anaro, ke ĉiuj fortostreĉe plenumu sian taskon kaj amplekse komuniku al reprezentanto de nia kara UEA, s-ino Ursula Grattapaglia la rezultaton de sia laboro, al adreso: Caixa Postal N^o 04-0097 - CEP 70.000 - Brazilio (FD). Esperantistoj, antaŭen!

☆☆☆☆☆

JUNULARA ANGULO

BEJO - Brazila Esperantista Junulara Organizo - informas, ke okazos junulara renkontiĝo de la 24-a ĝis la 28-a de januaro 1979 en Gojanio (GO).

La aliĝkotizoj: - Ĝis 30-jaraĝa, Cr\$ 150,00; pli ol 30-jaraĝa, Cr\$ 200,00; kaj por subtenanto-Patrono, Cr\$ 300,00. Adreso: S-ro Fabricio Rodrigues Valle Mono perpoŝtmandato aŭ ĉeko receivebla en Gojanio (GO) - Caixa Postal N^o 10.072.

☆☆☆☆☆

AINDA SOBRE O 1^o CONGRESSO LATINO-AMERICANO DE ESPERANTO

Publicamos a seguir o Parecer do Economista Roberto Jorge Aur - CRC - PR 5.570 "T" SP 595 - CRE 4948 - 2^a Região, datado de 02 de agosto de 1978 relativo à prestação de contas da Comissão Organizadora do 1^o Congresso Latino-Americano de Esperanto:

"DECLARAÇÃO - DECLARO para fins de Direito da Comissão Organizadora do 1^o Congresso Latino-Americano de Esperanto, e especialmente para prestação de contas junto aos órgãos públicos, que examinamos os documentos comprobatórios das despesas havidas com o 1^o Congresso Latino-Americano de Esperanto, sem encontrar nada que comprometesse a Comissão Organizadora, tendo este cumprido todas as obrigações legais e contratuais dela decorrentes.

Marília, 02 de agosto de 1978 -
a) Roberto Jorge Aur".

CARTA DA COMISSÃO DIRIGIDA AO MINISTÉRIO DA EDUCAÇÃO E CULTURA PRESTANDO CONTAS DOS TRABALHOS

"Marília, 02 de agosto de 1978.
Ao Ministério da Educação e Cultura.
Jurisdição nos Estados de São Paulo e Mato Grosso do Sul
Setor Análise de Contas
Rua Apa, 83 - São Paulo (SP)

Prezados Senhores,

O Presidente da Comissão Organizadora do 1^o Congresso Latino-Americano de Esperanto e na qualidade de representante do Conselho Brasileiro de Esperanto, vem indicar, na forma detalhada, a documentação comprovadora da aplicação dos recursos recebidos em 22 de fevereiro de 1978, mediante MEC PNDE OP - 123 na importância de Cr\$ 120.000,00 (cento e vinte mil cruzeiros), recursos recebidos pelo Banco do Brasil - Agência de Marília, SP, - para realização do 1^o Congresso Latino-Americano de Esperanto, no período de 17 a 22 de julho de 1978.

Os documentos em anexo estão relacionados e correspondem ao total recebido. Atenciosamente, Wilson Ferreira Martins - Presidente da Comissão Organizadora do 1^o Congresso Latino-Americano de Esperanto".

RELATÓRIO DA DOCUMENTAÇÃO COMPROBATÓRIA DAS CONTAS DAS DESPESAS DO 1^o CONGRESSO LATINO-AMERICANO DE ESPERANTO

Entidade: Conselho Brasileiro de Esperanto
Data do recebimento dos Recursos: 22 de fevereiro de 1978.

O signatário, Wilson Ferreira Martins, na qualidade de representante da entidade supra mencionada, vem indicar, na forma abaixo detalhada, a documentação comprovadora da aplicação dos recursos recebidos em 22 de fevereiro de 1978, através do Ministério da Educação e Cultura - MEC PNDE OP 123, a importância de Cr\$ 120.000,00 (cento e vinte mil cruzeiros), recursos recebidos por meio do Ban-

co do Brasil - Agência de Marília (SP), para a realização do 1º Congresso Latino-Americano de Esperanto, no período de 17 a 22 de julho de 1978.

Os documentos abaixo relacionados correspondem ao total recebido.

Data do Documento	Espécie do Documento	Nº do Documento	Valor: Cr\$
01 - 15/07/78	Nota Fiscal	010	52.500,00
02 - 20/07/78	Recibo	001	4.000,00
03 - 09/08/78	Nota	17.721	5.214,00
04 - 25/07/78	Recibo	002	2.500,00
05 - 26/01/78	Recibo	003	12.000,00
06 - 22/07/78	Recibo	004	14.000,00
07 - 22/07/78	Recibo	005	6.000,00
08 - 22/07/78	Recibo	006	16.000,00
09 - 20/07/78	Recibo	007	2.800,00
10 - 21/07/78	Recibo	008	5.000,00
11 - 22/07/78	Recibo	009	5.000,00
			125.014,00

Marília, 02 de agosto de 1978

a) Wilson Ferreira Martins - Presidente da Comissão Organizadora
Vice-Presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto para Cultura e Ensino.

GRATULTELEGRAMO

La prezidanto de BKE, sam-no F. S. Almada, sendis telegramon al Lia Eminenta Moŝto la Episkopo de Romo, Johano Paŭlo la II-a, Vatikano, Romo, kun la jenaj vortoj: "Brazila Konsilantaro de Esperanto pere de sia prezidanto, en la nomo de 25 organizaĵoj esperantistaj de Brazilo, varme gratulas vin kiel novan reganton de la monda katolikismo, esperante ke la nuna anstataŭanto de sankta Petro havu feliĉan regadon. Ni petas vian benon por ni kaj por nia anaro. Respekto-plene, via F. S. Almada".

☆☆☆☆☆

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis kaj dankas el tuta koro la jenajn periodaĵojn: La Lampiro, Svisa Fervojisto, A Cidade de Santos, Correio Fraternal do A.B.C., S.E.K., Matutino Popular, A Nova Era, Destaques, Meninão Santista, O Fluminense, A Candeia, La Skolta Mondo, Diário da Tarde, Semanário kaj Vinha de Luz.

☆☆☆☆☆

MONO RICEVITA

Ĝoje ni akceptas la malavariajn do-

nacojn de niaj legantoj, helpante nian bultenon, kion ni tutkore dankas:

Claudio Zimmermann Cr\$ 100,00
D-ro Lacorday Andrade 200,00
D-ro Alberto Flores 200,00
Oscar Arruda 100,00
D-ro M. Belmonte de Abreu . . . 300,00
Tezo de Prof-ro Passini 100,00
Sumo 1.000,00

☆☆☆☆☆

SCIIGOJ ...

NITEROI (RJ) - La gazeto "O Fluminense" en sia suplemento "Pingo de Gente" aperigis intervjuon pri Esperanto, kiun donis sam-no D-ro Joaquim do Couto, prezidanto de Niteroi Esperanto-Klubo. La juna reportero, Mauro José Costa Junior, 13-jaraĝa, lernanto de la Instituto Abel, ekintervjuis demandante: Mi jam aŭdis pri Esperanto... en kiu lando oni parolas tiun idiomon?

D-ro Couto brile respondis al tiu kaj al multaj aliaj enketoj, kaj samtempe li dankis al la Prof-ino Nina Rita pro la laŭdinda laboro. Kiun ŝi faris, helpante dum la ekspozicio pri infandeseĝnaĵoj en Porto Alegre (RS). Ŝi sendis valorajn desegnaĵojn. Partoprenis la ekspozicion 40 landoj kaj ĝin vizitis pli ol 3.000 personoj. Bonega laboro, samideano Couto! Daŭrigu! Gratulon!

Daŭrigu! Gratulon!

☆☆☆☆☆

GARULHOS (SP) — Sam-no D-ro Lacorday Andrade, nia vicprezidanto, informas nin ke en tiu grava urbo la Esperanto-movado bone progresas

Ek de februaro de 1977 sam-no Andrade instruas al s-ro Antonio Carlos Martins, prof-ino Marcia Moino, D-ro Luiz Antonio Loyola, s-ino Zenaide Moraes Ferreira, kaj prof-ino Maria Aparecida Elias Barbosa. Tiuj personoj ellernis tuj la lingvon kaj nun instruas ĝin en diversaj lokoj. Li ofte faras klarigojn al pluraj ĝlernantoj dum 45-minuta prelego en la lernejoj. La renkontiĝojn ĉiam ĉeestas ĉirkaŭ 100 ĝlernantoj.

Li informas ankaŭ, ke la urbestro, prof-ro Nefi Tales, en bela kvartalo de Guarulhos inaŭguris straton kun la titolo "Rua Idioma Esperanto", laŭ la Dekreto n^o 5.214.

Nia vicprezidanto planas organizi esperantan ekspozicion kaj intertempe donas klarigojn al ĝlernantoj pri la valoro de la Internacia Lingvo.

Ni deziras plenan sukceson en lia laboro.

☆☆☆☆☆

SAN-PAŬLO (SP) — San-Paŭlo Esperanta Asocio kunvokis siajn membrojn al la ĵarkunveno, okazonta en la 25-a de ĉi tiu monato.

☆☆☆☆☆

SÃO CARLOS (SP) — Em ĉi tiu bela urbo okazos regiona renkontiĝo de esperantistoj en la 26-a de la nuna monato, kiam oni inaŭguros la novkreitan Societon de Esperanto. Pluraj kursoj funkcias nun kaj certe post la renkontiĝo la movado pli fortiĝos.

☆☆☆☆☆

BONA ESPERO — NOVA ESTRARO

La 9-an de julio pasinta, dum ĝenerala asembleo, estis elektita nova estraro por la periodo 1978/1981. La diversaj taskoj estis tiel distribuitaj:

D-ro Enivaldo Alves Silva . Ĝenerala Direktoro
S-ro Arthur Velloso . Administra Direktoro
S-ro Giuseppe Grattapaglia . Financa Direktoro
S-ino Ursula Grattapaglia . Soci-eduka Direktoro
S-ino Neusa E. de Araujo . Publik-rilata Direktoro

En la laborplano de la nova estraro estas la konstruado de nova lernejo per helpo de germana institucio "Terre des Hommes". Oni decidis ankaŭ pli bone programigi kaj distribui dum la ĵaro la vizitojn de brazilaj kaj eksterlandaj ĝesamideanoj kaj tiucele oni planas aranĝi apartajn renkontiĝojn kaj malgrandajn seminariojn. Intertempe oni petas la vizitontojn anonci la intencon viziti Bonan Esperon kun minimuma antaŭtempo de unu monato.

Nia BKE sugestas: Ĉar la orfoj de Bona Espero ŝatas ĉokoladon, certe ili demandas: "Kiu sendos ĝin al ni?"

Ĝesamideanoj, ĉirkaubroku ni iun orfon, tiel la Kristnasko iĝos pli dolĉa al li.

KOMUNIKO

Laŭ la Cirkulero n^o 4/78 de la Financa Direktoro de Bona Espero, kiu estas ĉefdelegito de UEA, krom vicprezidanto de nia BKE, kaj kiu rajtas kolekti la kotizojn de la Universala Asocio, por la ĵaro 1979, estas la jenaj la kotizoj:

Individua Membro kun Jarlibro	Cr\$ 160,00
Individua Membro Abonanto kun jarlibro kaj "Esperanto"	400,00
(Ĝis inklusive 25 jaroj ricevas senpage "Kontaktto" n)	—
Simpla abono de "Esperanto" (sen membreco de UEA)	240,00
Abono de "Kontaktto" (sen membreco de TEJO)	120,00
Aldona pago por Societo Zamenhof (apogantoj)	800,00

GRAVE!! — Por tiuj, kiuj deziras fariĝi Dumvivaj Membroj de UEA kaj neniam plu suferi pro la ĉiujaraj plialtiĝoj de kotizo, ekzistas unika ebleco. Ĝis la 31-a de decembro validas ankoraŭ la malnova kotizo de Cr\$ 5.625,00. Poste ĝi fariĝos Cr\$ 10.000,00.

ATENTU: — La membroj, kiuj deziras transpigi al UEA siajn kotizojn, povos tion fari pere de la ĉefdelegito. Sendu la koncernan sumon al lia adreso: Caixa Postal N^o 04-0097 — CEP 70.000 — Bra-

sflia (DF) - prefere per ĉeko pagebla en Brasília.

SOCIETO ZAMENHOF — Pro la ekzisto de volontuloj, kiuj deziras apogi finance la Universalan Esperanto-Asocion, ekzistis jam de kelka tempo la kategorio de Membro-Abonantoj, kiu estis anstataŭita de la Societo Zamenhof. Tiu ideo venis post la konstato de la valoro de la apogo vere esenca por la prospero de UEA. La persono, kiu fariĝas membro de la Asocio en iu ajn kategorio kaj deziras helpi ĝin, aldone inskribiĝas kiel membro de la Societo Zamenhof, kiu obligas al aliĝinto ricevi leteron de tempo al tempo de la Prezidanto de la Asocio kun aktualaj informoj pri ĝia stato. Ankaŭ al tiuj elementoj estas speciala akcepto dum la Universala Kongreso. Pliaj informoj estas haveblaj ĉe C.O. - Nieuwe Binnenweg 176 - NL - 3015 BJ Rotterdam (Nederlando).

☆☆☆☆☆

SÃO PAULO (SP) — De nia estimata sam-no Oscar Leite de Arruda, emerita, alta funkciulo de Banko de Brazilo, kiu estas memlernanto de Esperanto, ni ricevis leteron laŭdante nian modestan bultenon pere de kio li perfektigas siajn konojn pri la Internacia Lingvo, ĉar ĝi multe helpas lin kiel komecanto.

Ni dankas liajn afablajn vortojn, kiuj ĝojigas nin sciante, ke nia laboro helpas al niaj gesamideanoj. La ĝentilaj esprimoj ankaŭ entuziasmigas nin kaj devigas nin prizorgi nian laboron kun pli da atento. Koran dankon!

☆☆☆☆☆

PETROPOLIS (RJ) — Nia vicprezidanto Delio Pereira de Souza, direktoro de la Eldona Societo "Valdomiro Lorenz", sendis al ni libron kun la titolo "Tiel diris la Majstro", de Humberto Rohden, kion ni elkore dankas, kaj rekomendas. Ĝi estas aĉetebla ĉe la sama eldonejo — Cx. Postal 3.133 - ZC - 20.000 - Rio de Janeiro (RJ).

☆☆☆☆☆

VOLTA REDONDA (RJ) — Sam-no Ingeniero D-ro Alberto Flores, nia vic-

prezidanto, kaj samtempe konsilanto, sugestis al ni ĉiuj ke la anaro plurfoje jare renkontiĝu.

Tiuj renkontiĝoj okazu en iu urbo kaj la tuta regiono ĉeestu ĝin.

La spiritismaj esperantistoj kunvoku neesperantistojn kaj eluzu la okazon klarigi la valoron de la Zamenhofa idealo. Se ne akzistos en iu urbo aŭ regiono kursoj, almenaŭ fojfoje renkontiĝu unuopuloj por interesigi neesperantistojn esperantiĝi.

Ni trovis la sugeston bonega kaj ĉiu povos ĝin praktikigi dum la "Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto".

Sam-ano Flores gvidas kurson en fakultato de V. Redonda, kiu finiĝos en decembro venonta, sed ne kiel ni erare anoncis, pro kio ni pardonpetas.

☆☆☆☆☆

JUIZ DE FORA (MG) — Bone funkcias la kurso ĉe la Federacia Universitato de J. de Fora, gvidata de la Magistro José Passini, nia vicprezidanto.

En la sama urbo estas aliaj kursoj gvidataj de la diligentaj Prof-oj José Marcilio kaj Kleber Halfeld, kiuj bone funkcias normale.

Dufoje semajne ili renkontiĝas en la domo de Usona Kulturo, kie ili donas klarigojn al interesuloj pri Esperanto. Ili faras lingvajn prikomentojn, kiuj helpas la ekzercadon de la internacia ligvo kaj elmontras, ke Esperanto estas bele parolebla. Ilia iniciato estas tre laŭdinda.

☆☆☆☆☆

ESPERANTO ELEMENTAR

La lernolibro de nia Prezidanto estas daŭre serĉata por la komencantoj. Oni ĝin povas aĉeti en San-Paŭlo Esperanto-Asocio, Av. S. João, 1333 - 2º - São Paulo kaj en Santos en la librovendejo "Pingo de Luz" — Rua Marechal Deodoro, 11 - CEP 11.100 aŭ rekte en nia redakcejo. En UBERABA (MG) ĝi troviĝas ĉe la Liga Uberabense de Esperanto - Rua Sete de Setembro, 28 - CEP 38.100, kaj en Brasília (DF) — CEP 70.000 - ĉe Libro-Servo de Brasília Esperanto-Asocio, Caixa Postal nº 04-0406.

KOREKTAJO

En nia Bulteno n^o 38, sur la paĝo 2 estas informo pri nia kara vicprezidanto, D-ro Modesto Belmonte de Abreu sub la titolo D-ro Manuel Belmonte de Abreu, erare presita. Ni pardonpetas pro tiu neatendita ŝanĝo, pri kio repondekas la fajlisto.

☆☆☆☆☆☆☆☆

LINGVA PRIKOMENTO

D.W. Argentino

"La rajdanto alvenis kaj tuj desaltis de la ĉevalo". La vorto "desaltis" ne estas klara, ĝi ne diras, ke la rajdanto desaltis de sur la ĉevalo. Ŝajnas, ke la vorto "degli-tis" de la ĉevalo estas pli taŭga. La prepozicio "kontraŭ" estas tre elasta; ĝi povas akcepti diversajn signifojn. Ĝi montras 1) objekton aŭ personon al kiu estas direkta-ta malamika, malutila, malfavora ago: "eĉ kontraŭ pastra prediko troviĝas kritiko; kontraŭ peko batalu, sed pekanton ne tuŝu; la komitato nenion havas kontraŭ Svisujo; ŝi levas la bastonon kontraŭ lin; kontraŭ min mem sin turnis mia ruzo; Kaino leviĝis kontraŭ sian fraton; " 2) objekton, kies naturan pozicion, direkton aŭ tendencon oni inversigas: "ne karesu la katon kontraŭ la haroj; naĝi kontraŭ la fluo; agi kontraŭ la kutimoj; paroli kontraŭ sia konscienco"; 3) objekton por kiu oni ŝanĝas ion: "li donis grenon kontraŭ armiloj; kontraŭ dek svisaj frankoj mi sendos poŝtmarkojn; — Li pacience malfermis la nuksojn" anstataŭ "li pacience krevigis la nuksojn; li havas krevajojn (kaŭzitaĵoj de malvarmo. "Nia societo devas fari grandajn klopodojn por ke la kurso bone funkciu" — Ĉtiu frazo devas tiel finiĝi: " ... por ke la kurso bone funkciu". Post la vortoj "po ke" la verbo havas "u" — finaĵon. — "Tio estas kortuŝo" — La lasta vorto tie ĉi devas esti "kortuŝa" ĉar ĝi rilatas al pronomo "tio". Ni diru: Tio estas borvena; tio estis danĝera, ktp. De ĉe mia domo li povis vidi la riveron" La formo "de ĉe" estas malĝusta. Sufiĉas diri: "de mia domo" .. — Estis mia decido, ke ĉiu pagus por la aliĝo" — Malbona

estas la vorto "pagus", devus esti "pagu". Post vortoj, kiuj esprimas volon, deziron, ordonon, ktp, la verbo havas u-finaĵon. — Se mia provleciono estus fruktodona, ni devas ĉion detale antaŭ prepari". "Fruktodona" estas malbona formo. Ni diru: "fruktodona". Ankaŭ la komenco de la frazo devas esti: "Por ke mia provleciono estu fruktodona ..." — Ni nur pensas kiel kontentigi la novaliĝintojn". La vorto "nu" estas en malĝusta loko. Ĝuste: Ni pensas nur kiel kontentigi la novaliĝintojn. Tion intencis diri la verkinto de tiu ĉi frazo. Sed la citita frazo signifas ke ni nur pensas sed ne faras ion por kontentigi ... " Grava estas la vortordo ĉar ĝi povas ŝanĝi la sencon de la frazo. — Mia patro iris tuj ĉe la ladisto". Ĉi tie la prepozicio "ĉe" estas malbona. Oni devas diri: "iris al la ladisto".

☆☆☆☆☆☆☆☆

KIO ESTAS ESPERANTO?

Ĉu iu nova religio?
Ĉu banalfilozofio?
Ĉu invento frenezula
Kaj miksaĵo burleskula?

Ĉu sencela utopio,
Ridindaĵo kaj vizio,
Iu kimera azenaĵo
Kaj mokinda maljunaja?

Ĉu ĝi estas parolebla?
Ĉu skribata? Ĉu legebla?
Esperanta amikaro,
Ne koleru, ne eraru,
Ne batalu, ne insistu
Ĉe naiva rutinisto.

Varbu saĝe junularon!
Diru al ĝi la intencan;
Ke Esperanto estas tio:
Kaj poezio, kaj scienco.

Estas paco, harmonio,
Estas ĝi REVOLUCIO!

D-ro Geraldo Soeiro